

MONDA ARKIVEJO DE LA ESPERANTO-HEREDAĴO (DUA PARTO)

En la dua pasintjara numero de Horizon-taal aperis anonco kaj alvoko pri Monda Arkivejo de la Esperanto-Heredaĵo. Alvenis al mi kelkaj kuraĝigoj, sed neniŭ (= nul?) sinpropono, kvankam la demando estis klara: ĉu vi vidas ian rolon por vi en ĝi, aŭ eĉ nur dubas pri rolo, tiam bv. kontakti min.

Ĉu do vere mi konkludu ke la aktivula mondo en Flandrio elĉerpiĝis aŭ eĉ jam formortis? Ĉu do vere neniŭ interesiĝas pri la esperanta heredaĵo? Aŭ ĉu ni simple ĉiuj pensas: nu, aliaj tion faros... eble... Nu, aliaj flandroj ne faros, tio nun iĝis klara.

La kvar kondiĉoj por tia arkivejo plu restas la jenaj: (1) daŭra jura strukturo sendependa de persono, (2) loko por ĉion stoki, (3) homoj kiuj administras, konservas kaj evoluigas la tuton kaj fine (4) la mono necesa por ebligi la unuajn tri kondiĉojn.

La tria el la kvar kondiĉoj en Flandrio evidentiĝas neebla: mankas ĉi tie volontuloj. Pro tio la konkludo iĝis neevitebla: Flandrio/Belgio perdas la eblecon krei la plej grandan Esperanto-arkivon en la mondo. Ĝi iros al eksterlando. Tial la ĉi-tie planita domo por ĝin konservi ne realiĝos (almenaŭ ne por tiu celo).

La nura kialo de tiu perdo estas la manko de nur kelkaj volontuloj! Kelkaj homoj kiuj volonte spertiĝus pri la verkaro en kaj pri Esperanto, kiuj malkovrus presitajn trezorojn, kiuj pretas kontakti aliajn bibliotekojn kaj


arkivojn pro interŝanĝi kaj tiel pliriĉigi kaj evoluigi la arkivon, kiuj emas skani malnovajn verkojn.

Ne dubu, konkretaj traktadoj kun eksterlando okazas, eĉ jam konkrete liveris rezulton. La asocio IEA (Internacia Esperanto-Arkivo) estas fondita en la 20-a de novembro, ĝia retejo ekzistas (arkivo.eu), sufiĉe granda ejo estas aĉetita en Slovaka urbeto, la volontuloj tie haveblas, la translokiĝo de la pli ol 20 000 eroj (plus pli ol 10 000 duoblaĵoj) baldaŭ komenciĝos.

Mankas nur mono, multa mono. Ĉu eble tiu jes troveblas en Flandrio? Ĉu vi kunfondos la arkivon aŭ almenaŭ iĝos ĝia Amiko? Klarigojn vi trovos ĉe arkivo.eu!

Marc Vanden Bempt (marc@esperanto.be)

P.S.: Jen nobla celo por la centoj da eŭroj kiujn vi ĉiumonate ŝparis pro la neeblo iri al restoracio en la pasintaj monatoj ;-)



Dum la virtuala Zamenhoffesto, Marc prezentis novan asocion: Internacia Esperanto-Arkivo. La asocio celas kolekti, arkivi, protekti, administri kaj fari alireblaj librojn, revuojn kaj aliajn dokumentojn en kaj pri Esperanto kaj planitaj lingvoj, en sia originala formo. Tiu ĉi arkivo celas konservadon kiel heredaĵo, por nelimigita tempodaŭro. La filmeton vi povas respekti en Jutubo je la adreso www.mallonge.net/iea.

Informojn pri la asocio vi trovos en la provizora retejo www.iespa.eu, la definitiva retejo estos www.arkivo.eu

